

JANUARO  
FEBRUARO  
1977

104

(1)

heis  
heis  
heis  
heis  
heis  
heis

NOVA JARO...



... NOVA ARO

HEJS - Januaro-Februaro 1977 - N-ro 104 (1)  
INTERNA BULTENO DE HEJS (HISPANA ESPERANTO-JUNULARA SEKCIO)  
Sidejo: Gral. Mola, 99, 1º - SABADELL (Barcelona)  
Poŝta adreso: Apartado 407 - SABADELL (Barcelona)  
Konto n-ro 15049-56 en Banco de Sabadell (ĉefa oficejo)  
Konto n-ro 830916 en Caja Postal de Ahorros

ESTRARO

PREZIDANTO

Ludoviko de Yzaguirre  
Pare Claret, 446  
BARCELONA-16

VICPREZIDANTINO

Silvia Martinez  
Bonavista, 163  
SABADELL

SEKRETARIINO

María Jesús Molina  
Maladeta, 30  
SABADELL

KASISTO

Josep Cara  
Gambús, 44, 3º, 2ª  
SABADELL

REDAKCIA KOMITATO

ĈEFREDAKTORO

Oscar Puig  
Güell i Ferrer, 223  
SABADELL

HELPREDAKTORO KAJ GRAFIKISTO

Francesc Cara  
Gambús, 44, 3º, 2ª  
SABADELL

TEKNIKA RESPONDECULO

Johano Guiñón  
Wifredo, 6, 3º, 2ª  
BARCELONA-1

FAKĈEFULO PRI DISTRAĴOJ

Johano Guiñón

FAKĈEFULO PRI TRADUKAĴOJ

Ludoviko de Yzaguirre

PRI LA ARTIKOLOJ SUBSKRIBITAJ, RESPONDECAS NUR LA AŬTORON, KAJ PRI OFICIALAJ KOMUNIKOJ, ĈEFARTIKOLOJ, K.T.P., RESPONDECAS TUTAN ESTRARON KAJ REDAKCIAN KOMITATON.

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ POR PUBLIKIGO DE ORIGINALOJ

Ni akceptos originalojn por ebla publikigo en HEJS-Bulteno, kiuj havos jenajn minimumajn kondiĉojn:

- La aŭtoro povas esti aŭ ne membro de HEJS.
- Ĉiu materialo alvenanta por publikigo estos esperante skribita.
- Tajpu je duobla spaco la originalojn.
- Sendu ĉiam kopion, kun la originalo.
- Estos bonvenataj desegnaĵoj, fotografiaĵoj, kaj alia grafika materialo akompanantaj la originalon.
- Ni ne resendos la originalojn nek korespondados pri ĝi kun la aŭtoro.
- Se vi deziras aperigi sub pseŭdonimo viajn kreaĵojn, nepre ni devas scii vian veran nomon kaj adreson, ĉar laŭleĝe la redakcio devas scii tion.

Ofsete Presas: "Copistería Reñé" - Julián Portet, 3, pral., 1º - BARCELONA-

© HEJS 1977 - Depósito Legal 8. 6519 - 1977

# ... KAJ NOVA ESTRARO

Nu, en viaj manoj troviĝas bulteno malsama al la antaŭaj, frukto de la ekfunkciado de la novaj estraro kaj redakcio. La sidejo de HEJS ekde ĝia naskiĝo en januaro de 1959 jam translokiĝis plurfoje kaj vizitis diversajn hispaniajn urbojn por reiri al ĝia naskiĝloko. Kaj certe antaŭ ol finiĝos tiu ĉi jarcento ankoraŭ vojaĝos sufiĉe.

Kial, vi demandas, la estraro de HEJS estas en la manoj de la katalanoj? Ni preskaŭ ne scias tion, ĉar la ekstiĝinta estraro post la studado de la diversajn enŝtatajn junularajn grupojn, konstatis, ke tiu kataluna grupo havas la minimumajn kondiĉojn por antaŭenpuŝi nian Sekcion. Tiu procedo, laŭ ni, ne estas la plej ĝusta, ĉar la membroj de HEJS havis en tiu afero nek voĉon nek voĉdonon por elekti estraron reprezentantan -teorie- ilin. Pro tio ni konsideras, ke la nuna estraro devas esti provizora, ĝis kiam la membroj almenaŭ, se elekti ne eblas, akceptu aŭ ne ĝin. Niaj postenoj ekde nun, do, estas je dispono de la membraro.

Ni kaj certe ĉiuj membroj esprimas, pere de tiuj linioj, nian sinceran dankemon al la ĝisnuna estraro, kiu malgraŭ la malfavoraj cirkonstancoj sukcesis dum 6 jaroj surporti la torĉon de la hispania junulara movado kun persisto, entuziasmo kaj plena dediĉo, kiuj ja meritas niajn aplaŭdojn. Samtempe ni devas bedaŭri, ke pro la izoliteco de la laborantaj estraranoj, ili ne sukcesis solvi ĉiujn ekzistantajn problemojn, kaj estis devigataj forlasi la laboron.

Ĝis nun ni konstatis ke, pro manko de personoj kaj tempo, HEJS-laboro preskaŭ nur estis eldoni bultenon, laboro kiu malgraŭ esti grava kaj daŭriginda, estas ne sufiĉa, ĉar eldono de bulteno devas esti ilo por atingi ion, kaj ne la celo de la laboro.

Krom la bulteno, kiu daŭre aperos kun, espereble, sama reguleco kiel ĝis nun, ni dezirus realigi kelkajn esperojn, cele al konsciiĝo de la junularo pri la lingva problemo kaj oferado al ili de nia solvo. Por sukcesigi tiun laboron, ni bezonas materialon, informojn, studojn, sperton, k.t.p., kiujn ni akiros per pliaj kontaktoj kaj opiniaj interŝanĝadoj kun KER (Komisiono pri Eksteraj Rilatoj) de TEJO, kun TEJO mem, kun la landaj sekcioj de TEJO, k.a. Ĉion interesan eltiritan de tiuj kontaktoj ni sciigos al la membraro pere de nia bulteno kaj de la Delegitoj. Per ili, ni intencas konstrui kompaktan reton, kiu kovru la tutan ŝtatan teritorion.

Cele al tiu konsciiĝo de la junularo pri la lingva problemo, ni laŭeble laboros en ĉiuj frontoj, kie troviĝas junuloj. Pro tio nia laborlinio estos jena: ni ne propagandos Esperanton kiel miraklan rimedon solvontan ĉiujn lingvajn problemojn de la mondo, sed unue konsciigante ilin pri la nuna lingva situacio, kaj pri tio, ke ĝi ne estas izolita, sed konsekvenco de la ekonomiaj, politikaj, sociaj, kaj kulturaj cirkonstancoj. Laŭ tio, Esperanto, nia Movado, kiuj intencas solvi tiun problemon, ne povas fari tion rigardante nur unu parton de la problemo, sed la tuton. Tion ja faros ni!

Nun, nur restas al ni averti vin pri la respondecado de ĉiu membro: ĉiu el vi havas la rajton kaj la devon partopreni aktive kaj tute ne pasive la ĉiutagan vivon kaj disvolviĝon de nia Sekcio, ĉar ĉiam rememoru, ke HEJS estas nek de la Estraro, nek de la Redakcio, nek de la Federacio. HEJS estas ĉies kaj de ĉiu, junaj hispaniaj esperantistoj.



# MARŜADO POR LA LIBERECO

Dum ĉi tiu somero, kiel vi eble aŭdis, okazis la Marŝado por la Libereco tra ĉiuj katalunaj komarkoj.

La oficiala kunvoka flugfolio, facile trovebla surstrate tekstas jene:

"Kataluno: En la kadro de la lukto por libera socio, kie ne ekzistu ekspluatado de la homo far la homo, oni kunvokas vin partopreni la Marŝadon por la Libereco, kiu trairas ĉiujn katalunajn regionojn dum ĉi-venonta somero. Ĝi estos neperforta, nova kaj aktiva, renkontejo por uloj ĉiuagaj, ĉiustataj kaj ĉiutendencaj. Ekde minimuma postulaĵo pri libereco, la marŝado volas kontakti kun la realaĵo de ĉiu loko el Katalunujo, samtempe vekante kaj vivigante proceson de diskutado, de kritikado kaj de mobilizado de nia popolo cele al liberiĝo."

Malgraŭ la registrara malpermeso, kiu signifis konsidereblan mankon el eblaj partoprenantoj, la marŝado okazis kun konstanta sukceso, sub la flago de la kvar punktoj de la Kataluna Asembleo konkretitaj en la krio: "Libereco, Amnestio kaj Aŭtonomiga Statuto".

La plej indigniga aspekto de la Marŝado estis la troan bridon kiu akompanis la Marŝadon dum la sepdek tagoj, dum kiuj trairis Katalunujojn, trapasante pli ol 300 vilaĝoj. Eĉ pluraj vilaĝoj estis okupitaj far 1500 ĝendarmoj, por malebligi la eniron de la 10 vojaĝantoj, kiuj dum tiu momento konsistigis la kolumnon.

La arestadoj estis tre oftaj, kaj samtempe ne-logikaj en sia plimulto, do oni arestis pro donaco de ruĝaj diantoj, pro trinkado el akvo en publika fonto, pro sidiĝo en restoraciaj seĝoj aŭ pro kiu ajn ŝajna bagatelaĵo. Samtempe oni pagi-



gis fortajn punojn ĝis 100.000 ptojn pro nure vesti la marŝadan kamizolon.

Kion ni ne komprenas neniel estas, ke dum la ĝendarmoj bridas forte kaj konstante kelkajn junulojn kiu nure piediras tra Katalunujo, la faŝistaj klikoj subskribas minacajn leterojn, batas marŝadantoj kaj bruligas domojn (Tàrrega) tute senpune.

Malgraŭ ĉio, kiuj partoprenis en la Marŝado por la Libereco, povas certigi, ke la kataluna popolo vekigis de la longa letargio al kiu ĝi estis ĝis nun submetita, kaj jam vere ekmarŝas al batalo por pli justa socio.

La Marŝado por la Libereco estis prezentita al la lasta Internacia Junulara Kongreso en Tessaloniki (Grekujo). Dum ĝia prezento, personoj el multaj landoj interesiĝis pri la iniciato. Ankaŭ la komitato de TEJO faris rezolucion pri ĝi:

"La Komitato de TEJO, kunveninta en Tesaloniko (Grekujo) de la 24a ĝis la 31a de Julio 1976: 1e. aŭskultis la senditon de la Marŝado por la Libereco, kiu estas kataluna popola manifestacio, kiu celas plibonigon de la sociaj kondiĉoj, rilate ankaŭ la lingvan kaj kulturan problemojn. 2e. taksis ĝin pozitive, precipe ĉar ĝi celas socian plibonigon ankaŭ en la kampo lingva. 3e. salutas ĝin."

Ankaŭ niaj plej prestiĝaj revuoj informis pri tio. HEROLDO DE ESPERANTO (n-ro 1601/02, 1 Septembro 1976), en sia raporto pri la kongreso, informis pri tiu rezolucio de TEJO-Kongreso esprimanta simpatian al la Marŝado. En sia sesa paĝo, HEROLDO prezentas fotojn pri dancantaj gejunuloj, unu el kiuj surportas la emblemon de la Marŝado. Ankaŭ nia kolego ESPERANTO en sia Septembra (849a) numero mencias la aferon: "Estis akceptitaj du kongresaj rezolucioj, el kiuj la unua tuŝis la rolon de la lingvo en la socio, dum la dua certigis pri la apogo de TEJO al la lukto de minacataj lingvoj kaj kulturoj..." (paĝo 155).

Fine, FENT CAMI, bulteno de la Marŝado, informis pri tiu ĉi prezento kaj finis la informon per kelkaj vortoj en Esperanto.

-Vicenc Clarés-  
SABADELL

# KARAKTERA MOLECO

Iutage, kiam mi dormis, kion mi multfoje faris, ekvekis min bruo, venanta el mia skriboĉambro.

- Jen denove -mi alparolis min- La rabisto.

Subtile, marŝante sur la piedpintoj, mi trairis la spacon, kiu disigis min de tie, kie oni min priŝtelis. Tie staris nekonata homo, havanta sakon, kiu elektis tiujn el miaj proprajoj, kiuj plej multe plaĉis al li, kaj kolektis ilin en amaso.

- Haltu, ni preparolu tion -diris mi al li-.

Li sin turnis sen ektimo nek surprizo, rigardis min de la piedoj ĝis la kapo, kaj respondis:

- Neneĉese. Mi venkas. Nu, laŭokule, mi pezas ĉirkaŭ dudek kilogramojn pli ol vi. Tiu ĉi natura avantaĝo ŝparigas al mi ĉiajn klarigojn. Ĉu vi estas armita?

- Ne

- Des pli.

Kaj li ekplenigis la sakon per miaj havaĵoj kvazaŭ mi forestus.

Mi, kiel decas, tute ne rezignis:

- Sed, homo, tiujn ĉi aferojn oni ne mezuru laŭ forto. Ekzistas morallo, ĉu vi komprenas? Senprincipeco kondukos vin nenien kaj ĉiuj kaŝri-gardos vin...

- La moralo! -li diris- Ĝi estas la plej sentaŭga pezaĵo, de kiu povas homo esti ŝarĝita.

Kaj, subite gravmieniĝinte, li demandis min:

- Ĉu ververe vi kredas je la moralo?

- Kompreneble, pro la Dipatrino, kompreneble.

La certigo pri mia fido trafis lin kiel kontraŭaĵego. Li forlasis sian laboron, prenis min je la brako kaj sidigis min apud lin sur sofona.

Kaj diris al mi jenajn vortojn:

- Vidu, ĉar vi ekkomparigas min, mi deziras havigi al vi la helpon de mia sperte.

"Mi, antaŭ longe, ankaŭ fidis la moralon. Mi edzis, havis filon, koran amikon kaj negocon. Mi indis la famon esti la plej bona homo en mia kvartalo, kaj, sekve, ankaŭ la plej naiva. Mia konfesprenisto ek-tremis, kiam li min nur ekvidis, ĉar mia pura konscienco tute malebligis al li fari belan laboron. "Kiom teda vi estas" kutime diris, kaj laŭmandate benis min.

"Kelkfoje mia tedo ektimigis min, sed la paco de mia hejmo, la bona famo de la familio kaj la mora pureco akompanis min. "Elportu, knabo, elportu -mi diris al mi- Ĉio tio ĉi estos rekompencata al vi".

"Kaj ĉu vi imagas, kia estis mia rekompenco? Tuj mi rakontos: iutage mia filo, kiu ĵus iĝis dekkvarjaraĝa forfuĝis kun la servistino. Komfuzita, mi iris serĉi mian edzinon por dispartigi mian suferon kun ŝi, sed mi trovis nur leteron el ŝi, pere de kiu ŝi rakontis al mi, ke, enuigita de mia tedeco, ŝi iris kunloĝi kun viro el la tria etaĝo, kiu ja certe estis simpatia kaj sciis bonvivi.

"Trafegita, mi decidis dediĉi ĉiujn miajn fortojn al mia negoco kaj post nur du tagoj mi sciiĝis, ke mia kora amiko, per komerca manovro, forprenis ĝin al mi.

"Restis al mi nur la konfespreniston. Mi rakontis al li ĉion kio okazis, kaj li senhezite respondis, ke mi kulpis pri ĉio kaj aljuĝis al mi pezegan pentofaron.

"Kaj kio pri la bona famo, kiun mi estis ricevinta ĉe la kvartalo? Jen mi klarigos al vi: ĉiam, kiam mi marŝis surstrate, oni turnis sin rigardante min kaj ridis.

"Kiel vi facile komprenos, estis adekvata momento por bilancii mian vivon kaj konstati, ke, ĝis tiam, mi eraris. Ne eblas iri kontraŭflue kaj, se oni tion faras, oni devas elporti la sekvojn. Ĉio tio ĉi prezentiĝis al mi tiom evidenta, ke mi decidis ŝanĝi mian vivon.

"Nun mi agas laŭ mia plaĉo sen konsciencaj malhelpoj kaj ĉiuj opinias pri mi bonege. La virinoj interesiĝas pri mi, la gekonatoj proklamas mian simpatian kaj najbaroj plurfoje diras inter si: "Jen, vidu, kiom azena li ŝajnis, kaj li eble fariĝos eĉ gravulo".

"Tio ĉi estas ĉio. Se ĝi povas iel utili al vi, jen ĝi.  
- Mi akompanos vin -diris mi al li- Mi bedaŭrus fariĝi viktimo de malfruiĝinta decido.

La sekvantan tagon la ĵurnaloj publikis jenan novaĵon:

"Hieraŭ frumatene, ŝtelistoj eniris ĉe loĝejon en la Orienta Avenuo. Krom aliaj valoraj objektoj, oni kons-tatis, ke mankas la domposedanto, ĉar neniu scias ion pri S-ro Calders, honorinda civitano kaj bonmora impostpaganto".

1941

Pere Calders naskiĝis en Barcelono je 1912. Li studis pentrarton. Poste li kunlaboris al multaj katalunaj gazetoj kaj ĵurnaloj ĝis li foriris eksterlanden. En 1954 li ricevis la premion "Victor Català" per la rakontaro KRONIKOJ PRI LA KAŜITA VERO el kiu ni ĉerpis la rakonton "Karakterata moleco" kaj eble ni ĉerpos estonte aliajn.

El la kataluna tradukis D. Boi

---

## Korespondopetoj

- 10 Lernantoj 10-16 jaraĝaj deziras korespondi por ekkoni la vivon de homoj en diversaj landoj. La adreso de la profesoro estas:

Czestaw Bassara  
ul Dworcowa 138  
42-211 PIASEK (Pollando)

- Blinduloj kaj vidantoj kune lernantaj Esperanton deziras korespondi kun la tuta mondo.

Funkcias diversaj laborgrupoj laŭ la aĝo: geinfanoj de unugrada lernejo, geknaboj de mezgrada kaj plenaĝuloj. Ni garantias respondon. Bonvolu sin adresi al: Scuola Statale Istituto Ciechi  
Viale Fra Ignazio 100 - CAGLIARI (Italujo).



# EL LA ARKIVO

KANTO DE VAGABONDO  
Premiita ĉe la I.F.L.

La polv' sur mia plando:  
Jen estas mia lando  
La lito estas ĉies ter',  
Kovrilo mia la vesper',  
Birdar' al mi deĵoras  
Per amuzanta ĥor',  
La nuboj min priploras,  
Se tuŝas min dolor'.  
Hej, hola! Kia granda ĝoj'!  
Facila vag' sur landa voj'!

Mi vagas preterfluge,  
Sencele kaj senjuge,  
Kaj al knabino, al amik'  
Neniam ligu min radik'.  
Radiko ja profunde  
Penetras en la ter'.  
Kaj ĝi ŝiriĝos vunde.  
Ni ŝparu je sufer'!  
Hej hola, kia granda ĝoj'!  
Ensola vag' sur landa voj'!

En blu' de l' malproksimo  
Sin banas la animo,  
Dum inter prema ŝambra lim'  
La koron kovras ranca ŝim'.  
Filistro-invalido

Do putru en la niĉ'!  
Mi saltas el la sido  
Kriante pro l' feliĉ',  
Se vokas min pro granda ĝoj',  
Por nova vag' la landa voj'.

Se lumas sort' se nigras,  
Mi priŝajfante migras,  
Kaj kiam kontraŭ la stomak'  
Malsato venas por atak':  
Dum la stomak' eksonas  
Grumblante kun riproĉ',  
Mi fajfe primon donas  
Al ĝia basa voĉ'.  
Hej, hola! Kia granda ĝoj'  
Eĉ la malsat' sur landa voj'!

Kaj se pleniĝis listo  
Kaj venos la Faldisto,  
Post mi edzino kaj infan'  
Ne ploros orfe kaj sen pan'.  
Mi falas en la nego.  
- Adiaŭ bela vag'!  
Kaj la primorta preĝo  
Nur estos korva grak'.  
Anoncos poste hunda boj'  
Kadavron sur la landa voj'.

(Ĉerpita el Kataluna Esperantisto)

Kolomano Kalocsay

## EL NIA SEKRETARIEJO. EL NIA SEKRETARIEJO. EL NIA SEKRETARIEJO. EL N

- INTERNE DE ĈI TIU BULTENO, VI TROVOS ALIĜILON. NI PETEGAS AL VI, BONVOLU PLENUMI ĜIN KUN VIAJ PERSONAJ PETATAJ INDIKOJ KAJ TUJ SENDI ĜIN AL NIA SIDEJO. TIUJ ALIĜILOJ CELAS PRETIGI SLIPARON DE LA MEMBROJ, KIU ESTOS VERE UTILA KAJ BEZONA POR NI ĈIUJ, SENDANTE ĜIN KOREKTE KAJ RAPIDE AL NI, VI FACILIGOS NIAN TASKON. DANKON.
- EN LA LASTA KUNVENO DE K.K.K. (KATALUNA KUNORDIGA KOMITATO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO), LA REPRESENTANTOJ DE LA GRUPOJ DE SANT PAU D'ORDAL KAJ DE MOYA DONACIS POR H.E.J.S. 1000 PTOJN PO ĈIU. ALIAJ GRUPOJ ANKAŬ PROMESIS MONE KUNLABORI SE NECESE. KORAJN DANKOJN AL ĈIUJ.
- EKSTERLANDAJ ABONOJ AL HEJS  
DUMONATA REVUO, ORGANO DE HISPANA ESPERANTO-JUNULARA SEKCIO  
20 PAĜA, KOMPLATE ESPERANTLINGVA  
JARABONO: 10 GULDENOJ AŬ EGALVALORO  
MENDEBLA ĈE HEJS - APARTADO 407 - SABADELL - HISPANIO

La 33a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Poitiers (Puatje) de la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 1977. Nia kongresurbo situas je 330 kilometroj sudokcidente de Parizo al kiu ĝi estas bone ligata per ĉefstratoj kaj fervojo.

La diversaj eroj de nia kongreso okazos en la universitata kvartalo, kiu kvankam iom for de la urbo, estas ligata kun la urbocentro per aŭtobusoj.

La partoprenantoj en la 33a IJK loĝos en unullitaj ĉambroj en la studenta domo Descartes. Nia kongresejo, konstruaĵo de la Fakultato pri Sciencoj estas cent metroj for de la loĝejo. En la proksimeco ankaŭ troviĝas memserva studenta restoracio.

La elektita temo estas: "Problemoj de organizado kaj disvolviĝo de la esperantistaj junularaj movadoj". Multaj junaj esperantistoj havas spertojn pri agado en junularaj movadoj. Tiu IJK estos okazo por interŝanĝi ideojn kaj informojn, por raciigi nian laboron, kun la celo pli efike interveni kaj propagandi en aliaj junularaj movadoj.

Plie, se la Eŭropa Junulara Fonduso akceptas nin subvencii, okazos dum la kongresa semajno seminario de KER (Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO) pri "Regionaj lingvoj kaj kulturoj".

La IJK ankaŭ enhavos la kutimajn plimalpli distrajn partojn: vizito de la urbo, balo, teatra vespero, internacia vespero, tuttaga ekskurso, komitatkunsidoj de TEJO ...

Se vi estas preta kontribui en la programo de la kongreso, kontaktu nin ĉe nia konstanta adreso.

### ALIĜKOTIZOJ

	OKT-NOV DEC	JAN-FEB MAR	APR-MAJ JUN	JULIO
malpli ol 18 j.	315 4.410	335 4.690	355 4.970	375 5.250
18-21 j.	330 4.620	350 4.900	370 5.180	395 5.530
22-25 j.	345 4.830	365 5.110	390 5.460	415 5.810
26-29 j.	370 5.180	395 5.530	420 5.880	445 6.230
pli ol 30 j.	400 5.600	425 5.950	450 6.300	475 6.650

(Sure en francaj frankoj = FF)

(Sube en pesetoj, ni konsideras por kalkuloj, ke 1 FF = 14 ptojn).

Individuaj membroj de TEJO/UEA ĝuas rabaton je 25 francaj frankoj = 350 ptoj.

En la koro de la provinco de Poitou (Pŭatu), la dumil jara gastiganta urbo de la 33-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO troviĝas je la kruco de ĉefaj historiaj vojoj. Malmultaj urboj en Francujo povas montri tion multe da riĉaj kaj famaj monumentoj.

Konkerita de la romianoj en la jaro 51 nataŭ Kristo, tiam nomita Limonum, la urbo rapide fariĝis unu el la ĉefaj administraciaj kaj kulturaj centroj de la lando. De tiu tempo, kaj ĝis la 16-a jarcento, Poitiers partoprenis en ĉiuj gravaj eventoj de la franca historio.

Ĝia nomo estas internacie konata per tiu batalo kiam, en la jaro 732, Charles Martel haltis la araban invadon. Dum la centjara milito, ĝi fariĝis kelktempe franca ĉefurbo kiam la reĝo Karlo la 7a instaliĝis kun la parlamento. Li estis kronita en la katedralo en 1422. En 1429, Jeanne d'Arc, post juĝado ricevis la mision forĵeti la anglojn el Francujo.

Ĉiuj epokoj postlasis por ni monumentojn kiuj pruvas tiun gloran estintecon: multaj preĝejoj el la tipe regiona romanika stilo, gotika katedralo, grafpalaco, multaj domoj el la renesanco ...

Hodiaŭ, havanta 100.000 enloĝantoj, Poitiers estas provinca ĉefurbo. Historie religia, kultura kaj administracia urbo, ĝi nun malrapide industriiĝas.


Starigita en la jaro 1431 dum la centjara milito por kontraŭstari la parizan "Sorbonne" tiutempe subprenita de angloj kaj burgundoj, ĝia universitato estas konata per la priskriboj pri la ĝoja vivo de la studentoj faritaj de Rabelais, kiu siatempe tie studis.

La tuta ĉirkaŭanta regiono estas tre riĉa je monumentoj: romanikaj preĝejoj, fortikaĵoj, renesancaj kasteloj.

Konjako, ruĝaj kaj blankaj vinoj, fromaĵoj, helikaĵoj, kukoj estas specialaĵoj kiuj incitas la turistojn viziti tiun regionon.

**POITIERS**

**FRANCIO**



Sendu samtempe vian aliŝilon kaj kotizon al:

Poŝtĉekkonto: 31 709 94

Y LA SOURCE je la nomo de  
JEFO.

Junulara Esperantista Franca Organizo  
33a Internacia Junulara Kongreso  
4 bis, rue de la Cerisaie  
F - 75004 PARIS  
FRANCE - FRANCUJO.

# ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO INTERNACIA

La artikolo Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia estas verkita de Zamenhof por prezenti la anoncitan temon al la Kongreso de la Francia Asocio por Antaŭenigo de la Sciencoj (Association Française pour l'Avancement des Sciences). La pritrakto de la temo, do, estas farita ne por konvinki simplajn homojn, sed por argumenti logike kiel devas esti inter sciencistoj. L. L. Zamenhof, per logika rezonado, kies legadon mi varme konsilias al ĉiuj, komprenigas al ni, ke:

- 1.- La enkonduko de lingvo internacia alportus al la homaro grandegan utilon.
- 2.- La enkonduko de lingvo internacia estas tute ebla.
- 3.- La enkonduko de lingvo internacia nepre iam efektiviĝos.
- 4.- Kiel lingvo internacia estos elektita: arta lingvo.
- 5.- Tiu ĉi arta lingvo estos Esperanto.

Al tiuj ĉi konkludoj Zamenhof alvenas post tute senpasia kaj senpartia ĝusta argumentado. Ĝi estas prezentata per la forta kaj flua verbo de la Majstro, kiu dum la paĝoj de la artikolo (44 ĉe Fundamenta Krestomatio, 36 ĉe Originala Verkaro) daŭre logas nian atenton per ĝia agrableco. Al mi plaĉegis multaj paragrafoj, sed nun mi deziras prezenti fragmentojn el du paragrafoj, kiujn mi taksas speciale interesaj. Jen la unuaj fragmentoj, el la dua ĉapitro:

"Ĉu vi ekpensis iam pri tio, kio propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj, kiuj ja en efektiveco estas konstruitaj laŭ tiu sama tipo, kiel la homo? La tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto: al la posedado de lingvo, kiu ebligis al ni la interŝanĝado de pensoj". "Sed se la tre neplena kaj tre limigita ebleco de interŝanĝado de pensoj havis por la homaro tian grandegan signifon, ekpensu pri tio, kian grandegan kaj kun nenio kompareblan utilon donus al la homaro tiu lingvo, kiu farus la interŝanĝadon de pensoj plena, kaj dank' al kiu ne sole A havus la eblon kompreniĝadi kun B, C kun D, E kun F, sed ĉiu el ili povus kompreniĝadi kun ĉiu el la aliaj! Tuta centoj da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia!"

Se ni kontrolas ĉe PIVO la signifon de la vorto HOMO, ni legos: "genro de mamuloj, karakterizita per: 1e- vertikala teniĝo, 2e- forte evoluinta cerbo kaj 3e- parolkapablo". Estas nepre kunsentende, ke, el tiuj tri karakteriziloj, la du unuaj ne estas specife homaj, ili estas komunaj al aliaj bestoj. Restas la tria, kiu ja estas ekskluzive karakterizanta nur la homon. Jam antaŭ multaj jaroj la greka filozofo Aristotelo opiniis:

"La kialo, pro kiu homo estas besto pli sociema ol abelo aŭ iu ajn arema besto, evidentas: Naturo, laŭniadire, ne agas vane, kaj homo estas la sola besto, kiu kapablas paroli. Voĉo montrivas doloron kaj plaĉon kaj tial ĝin posedas ankaŭ bestoj, ĉar ilia estmaniero kapablas sensi doloron kaj plaĉon kaj komuniki tiujn ĉi sentojn unuj al aliaj; sed per parolo komunikeblas konveno kaj malkonveno, justo kaj maljusto, kaj estas ekskluzivaĵo de la homo, nur de la homo disde la ceteraj bestoj, distingi la esencon de bono kaj malbono, de justo kaj maljusto..." (Politiko, libro unua, ĉapitro dua).

Sekve, la homa besto distingiĝas per pli da sociemo danke al parolkapablo, al la ebleco interŝanĝi pensojn kun la ceteraj.

Mi ŝatus interpreti plie la vortojn de Lazaro Ludoviko Zamenhof: same kiel per parolkapablo la homo atingas plej altan lokon super la bestoj, samtiel niaj popoloj nun restas mutaj unu antaŭ la aliaj pro nekomprenlebleco kaj estas kvazaŭ bestoj, al kiuj mankas parolkapablo por atingi homecon: nur per helpa lingvo, kiu permesos al la popoloj interkompreniĝadi, la popoloj ĉesos esti bestoj kaj homiĝos. Dank' al Esperanto nia nuna besta homaro fariĝos homa homaro.

La aliaj fragmentoj estas jenaj:

"Ni faros malgrandan paŭzon kaj diros kelke da vortoj pri ni, batalantoj pro la ideo de lingvo internacia. El ĉio pruviĝa de ni vi vidas, ke ni tute ne estas fantaziistoj kaj utopiistoj, kiajn multaj el vi eble vidis en ni kaj kiaj nin pentras multaj gazetoj, ne dezirantaj eniĝadi en la esenco de tio, pro kio ni batalas. Vi vidas, ke ni batalas pro afero, kiu alportos al la homaro grandegan utilon kaj kiu pli aŭ malpli frue nepre estos atingita". "La estonteco apartenas al ni. Ni supozu, eĉ, ke tiu formo de lingvo internacia, pro kiu ni batalas, montriĝos en la estonteco kiel rara kaj ke venonta lingvo internacia estos ne tiu, kiun ni elektis, sed tio ĉi ja tute nin devas ne konfuzi, ĉar ni batalas ne pro la formo, sed pro la ideo, kaj formon konkretan al nia batalado ni donis nur tial, ke ĉia batalado abstrakta kaj teoria ordinaro al nenio kondukas". "Se ni, obeante la voĉon de la indiferenta egoismo, detenadus nin de nia laborado nur tial, ke kun la tempo la formo de la lingvo internacia eble estos alia, ol tiu, pro kiu nun ni laboras, tio ĉi signifus tion saman, kiel ekzemple rifuzi la uzadon de vaporo tial, ke poste eble estos trovita pli bona rimedo de komuniĝado, aŭ rifuzi regnajn plibonigojn tial, ke poste iam eble estos trovitaj pli bonaj formoj por la regna konstruo. Nun ni estas ankoraŭ malfortaj, kaj ĉia bubo povas ankoraŭ mokadi nin kaj montri nin per la fingroj; sed plej bone ridas tiu, kiu ridas la lasta. Nia afero iras malrapide kaj malfacile; tre povas esti, ke la plimulto de ni ne ĝisvivos tiun momenton, kiam montriĝos la fruktoj de nia agado kaj ĝis la morto mem ni estos objekto de moko; sed ni iros en la tombon kun la konscio, ke nia afero ne mortos, ke ĝi morti neniam povas, ke pli aŭ malpli frue ĝi devas atingi la celon. Kaj se eĉ, laĉaj de la sendanka laborado, ni kun malespero kaj apatio lasus fali la manojn, tute egale, la afero ne mortos: anstataŭ la lacigitaj batalantoj aperos batalantoj novaj. La posteuloj benos nian memoron, kaj al tiuj saĝaj homoj, kiuj nun nomas nin fantaziistoj, ili rilatos tiel, kiel ni nun rilatas al la saĝaj samtempuloj de la eltrovo de Ameriko, de la elpenso de vaporveturiloj k. t. p."

Oni povas facile konstati, ke la espero de Zamenhof je la estonteco kaj je la homaro estis granda sed ĝi ne estis pli granda ol estos la prodanka honorigo, kiun la estonta mondo dediĉos al li kaj al ĉiuj pioniroj de la ideo de lingvo internacia, de homa homaro.



# EŬREKA, EŬREKA!

La titolo mem jam signifas sukceson. Antaŭe, en miaj kunlaboraĵoj, mi neniam interesiĝis pri niaj komunaj laboroj, por nia afero, tio estas pri Esperanto. Sed hodiaŭ la lampo de mia menso lumigis kaj mi trovis efikan rimedon por rapidege atingi nian celon, por triumfigi Esperanton. Ĉu vi estas kontenta?, mi pensas ke jes, almenaŭ mi estas ege optimista kun mia malkovro.

Tamen la vero estas, ke mi ja inventis nenion. Mi nur celas apliki iujn formojn de la komercaj, ekonomiaj kaj politikaj rilatoj nuntempaj en nia Esperanto-Movadon. Mi pensas, ke ni devas organizi "laborajn tagmanĝojn". Kvankam ankoraŭ mi ne scias kial oni diras "laborajn matenmanĝojn", ĉar fakte ili ĉiam okazas tagmeze. Mi opinias ke tiujn manĝojn oni devus nomi "laboraj tagmanĝoj". Eble la kaŭzo estas ke tiuj altrangaj sinjoroj, kiuj prenas parton en tiuj bankedoj elliptiĝas tiel malfrue, ke tagmeze por ili estas la mateno kaj konsekvence estas tiu manĝaĵo la unua, kiun ili metas en siajn stomakojn, ĉu?

Jes, karaj samideanoj, ni forĵetu la malnovajn kutimojn kaj modernigu niajn laborformojn. Ni organizu tiajn "laborajn matenmanĝojn". Vi imagu, kian eĥon havus simila anonco en la enlanda gazetaro:

"EN LA HOTELO 'LA ESPERO' DE BARCELONO KUNVENOS EN LABORA MATENMANĜO LA SINJOROJ GVIDANTOJ DE H.E.J.S. (Hispana Esperanto-Junulara Sekcio). AL LA MENCIIITA LABORA MATENMANĜO ĈEESTOS LA URBESTRARA REPRESENTANTO POR KULTURAJ AFEROJ, JE LA FINO ONI DISDONOS OFICIALAN KOMUNIKAĴON POR LA GAZETARO"

Ĉiam la komenco devas esti modesta, sed iom post iom, ni pligrandigu, vastigu ĝin, tion ni devas fari pere de niaj "laboraj tagmanĝoj". Ili devas okazi ne nur en Barcelono, sed en la tuta lando, je nacia nivelo (eksterlandaj samideanoj baldaŭ venos por kopii kaj fine ni havus ion por eksporti). Ankaŭ ni devas inviti kiel eble plej grandan nombron da homoj. Tamen ni ne devas nur atenti pri la propagando, mi eĉ opinias ke dum la "laboraj tagmanĝoj" oni devas profiti la momenton por instrui Esperanton. Vi jam scias, ke ni esperantistoj estas tre ruzaj, kiam temas pri instruado de nia kara lingvo. Do, mi proponas, ke en iu momento de la kunmanĝado, preferinde post trinkado de la ĉampano, iu kuraĝa samideano stariĝu kaj diru: Amikoj la vino estas bona. Vivu la amo inter la personoj. (vi kostatu, ke por la unua fojo la frazo Esperanta estas tre simila al tiu en kastilia lingvo, poste jam venos la progresoj). Tuj sekve la kuraĝa kaj simpatia samideano amike kaj eduke ripetigu la frazon tri fojojn al la ceteraj kunmanĝantoj. Nu, ĉu vi povas imagi la rezulton, se en la komunikaĵo al la gazetaro oni aldonus; ke la sinjoro Ministro pri la Armeo parolis esperantlingve, ĉar vi ne dubu ke se ni kapablas organizi tiujn "matenmanĝojn" eĉ la ministroj ilin ĉeestos.

Kion penas la esperantistaro organizante kursojn, seminariojn, kvinjarajn planojn, laborgrupojn, petojn al la altaj instancoj, gluante afiŝojn en la montrofenestroj kaj multaj aliaj strebojn, kiuj ofte seniluziigas la bravajn esperantistojn.

Jen rimedo moderna, efika kaj kapabla sukcesigi nian ĉarman idealon. De tiuj "laboraj matenmanĝoj" ĉiam eliras sukcesoj en ĉiuj aspektoj kaj facetoj de nia ĉiutaga vivo. Kial Esperanto ne povas atingi samajn rezultojn?

Tamen griza nubo aperas, en ĉi tiu hela ĉielo, la financado de la projekto, kvankam la afero en mia opinio ne estas priokupiga, ĉar por tiu tasko ni jam havas kasiston, ĉu ne? Do, li zorgu kaj solvu la problemon, ĉu bone?

# SEMINARIO

## “DEMOKRATECO KAJ LINGVO”

Romo, 30-10/02-11-1976

Organizita de la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO kaj de loka komitato gvidata de Renato Corsetti (eksprezidanto de TEJO) kaj Maŭro Latorre, ĝi okazis en la ejo de "Società Italiana per le Organizzazioni Internazionale" (UNO-inform-oficejo). La temojn pritraktitajn ni povus disdividi laŭ jenaj tri grupoj: Lingvo-politiko (kun ok prelegoj), soci-lingvistiko (ses prelegoj) kaj persekutataj lingvoj kaj kulturoj (kvin prelegoj). Oni povas facile konstati, ke la seminario estis labor-plena, ĉar estis prezentitaj en sep duontagaj kunsidoj dek naŭ referaĵoj, kiuj estis poste pridiskutataj. En la Seminario uzatis du laborlingvoj: la itala kaj esperanto. Krom tio, kelkaj prezentoj okazis en aliaj lingvoj, el kiuj oni tradukis al ambaŭ laborlingvoj.

En la kampo pri la lingvopolitiko, reprezentantoj el Slovenoj, Komunisma Movado el Katalunujo, Francoj, Komunisma Movado el Vaskujo, Nederlandanoj, Afriko, k.a. skizis iliajn programojn por la estonteco, agadojn nuntempajn aŭ prijuĝojn pri la pasinteco. La konkludo estis, ke ĉie la lingvopolitiko estas plibonigebla, ĉie tie nepre, tie prefere. Lingvopolitiko povas aŭ rekoni la samajn rajtojn aŭ diskriminacii la lingvojn. Kaj estas klare, ke ni esp-istoj ne povus resti indiferentaj antaŭ lingva diskriminacio: 1e, ĉar tio kontraŭstaras la UNO-deklaracion pri homaj rajtoj, kaj 2e, ĉar la samaj homgrupoj, kiuj diskriminacias la aliajn homojn laŭ la lingvo, ofte opinias, ke ilia lingvo estas la plej taŭga kaj la sola uzenda por internaciaj rilatoj.

En la kampo soci-lingvistika, estis prezentitaj teknikaj pritraktoj de la temo. Ege interesa estis tiu de Nora GALLI DE PARATESI, "Forme di lingua e classe sociali" (Lingvo-formoj kaj sociaj klasoj). Ĝi traktis pri la fakto, ke en la lingvo ekzistas sublingvoj; nomataj "lektoj". Se tiu sublingvo apartenas al geografia grupo, ĝi nomiĝas dia-lekto. Se temas pri la lekto el iu socia klaso, ĝi nomiĝas soci-lekto. Ĉar la dialektoj jam estas sufiĉe vaste traktitaj, la prelegantino limigis sin al la socilektoj: ŝi, ekz-e, prezentis la kazon de la japana, en kiu ekzistas dudek du lektaj tavoloj, kiuj klasigas la parolantojn laŭ socia deveno. Ŝi prezentis ankaŭ la kazon de la profesiaj lektoj, aparta speco el soci-lektoj. Tiel la klasaj kiel la profesiaj socilektoj estas de ni konataj: ni povas citi kiel ekzemploj la kuracistan kaj la studentan lektojn.

En la kampo de la persekutataj lingvoj kaj kulturoj estis traktite pri la nuna situacio de Belgio, Katalunujo, Slovenoj en Aŭstrio kaj Italio, italiaj minoritatoj (germanoj, katalunoj, albanoj, grekoj, k.c.) analizante, ĉu la afero pli aŭ malpli boniĝis kaj kio necesas por pli justa stato.

La prelegantoj estis el dek landoj, precipe el Italio, kaj inter ili estis dek tri universitataj profesoroj, kiuj altigis multe la nivelon de la seminario per iliaj kontribuoj. Ĉeestis la seminarion naŭdek personoj el dek tri landoj: sesdek kvar estis italoj, la ceteraj dudek ses el aliaj dek du landoj.

Tre grava atingo estas la fakto, ke neesp-istaj italoj kaj esp-istoj divers-devenaj bone kunlaboris: danke al tio rompiĝis la barilo, kiu (laŭ la vortoj de H. Tonkin en Tesaloniko dum la lasta TEJO-kongreso) disigas la esperantistojn disde la "normala" mondo.

La partoprenintoj ellaboris jenan finan rezolucion, unu-anime akceptita:

"La partoprenintoj en la Seminario "Demokrateco kaj Lingvo", okazinta en Romo de la 30a de Oktobro ĝis la 5a de Novembro 1976a,

---favoras protekton (en la senco de sameco laŭ rajtoj) kaj valorigon de lokaj komunumoj -etne aŭ/kaj lingve difineblaj-, precipe ĉar kun la alieco karakterizanta tiujn komunumojn kun-iras sociaj kaj ekonomiaj malsamoj kaj/aŭ diskriminacioj ne plu allaseblaj;

---invitas ĉiujn, kiuj agnoskas tiujn-ĉi starpunktojn, strebi en siaj agadokampoj por disvastigi tiujn-ĉi valorojn, kontraŭ ĉia klopodo je super-rego fare de regantaj kulturoj, kaj en ŝtata, kaj en inter-ŝtata niveloj".

Resume, temis pri ege interesa renkontiĝo, kiu cetere eblis pro larĝa subvencio de Eŭropa Junulara Fonduso, el la Strasburga Parlamento.

Ludoviko de Yzaguirre



Nia prezidanto dum sia kontribuo al la seminario, akompanata de F. Pennacchietti kaj G. Cardona.







# ENHAVO

... KAJ NOVA ESTRARO .....	3
MARŜADO POR LA LIBERECO .....	5
KARAKTERA MOLECO .....	7
KORESPONDPETOJ .....	8
EL LA ARKIVO .....	9
EL NIA SEKRETARIEJO .....	9
IJK 77 .....	10
ESENCO KAJ ESTONTECO DE LA IDEO DE LINGVO INTERNACIA ....	12
EŬREKA, EŬREKA! .....	14
SEMINARIO "DEMOKRATECO KAJ LINGVO" .....	15
DIS-TRO .....	18
NI REKOMENDAS .....	20



Koboldeto enirinta nian redakcion. Li respondecas pri ĉio aperanta aŭ aperonta en nia bulteno, kontraŭa al la eternaj valoroj de nia Movado.



Eĉ tie vi povas verki artikolojn por HEJS.

# NI RIKOMBINDAS



LINGUA E POLITICA. Ni prezentas al la legantoj tiun ĉi libron, kies titolo en la itala signifas "LINGVO KAJ POLITIKO", imperiismo, nacia identeco kaj lingvo-politiko en Azio, Afriko kaj Latinida Ameriko, kiu estas aro el artikoloj far multaj el tiuj italaj profesoroj, kiuj kunlaboris al la Seminario Demokrateco kaj Lingvo (v. paĝo 15). Kelkaj artikol-titoloj povas esti tradukitaj jene: "Lingvo kiel politika ilo", "Historiaj disvolvoj kaj lingvaj problemoj ĉe arabaj landoj", "La lingvaj malplimulto el Irako", "Sŭahili: situacio kaj problemoj", "Andaj landoj: la monta lingvo nun al-iras la valojn", "Lingvistiko kaj politiko", kaj ok pliaj referaĵoj. La libro estas eldonita en la itala lingvo de officina edizioni kaj kontraŭ pago de pli-malpli 500 ptoj povas esti petata al la NUOVA FRONTIERA, Via Giordano Bruno n-ro 8, 56100 Pisa, Italujo. Ni konsideras, ke tiu ĉi kolektiva verko povas helpi nin vidi la lingvan demandon laŭ pli larĝa star-punkto kaj sekve juĝi tiun ĉi aferon pli objektive.




LA JUNA PENSO -Dumonata Esperanto-gazeto farita de la Junfako de S.A.T.-  
Ĝenerale la skribaĵoj tre libere verkitaj (liberecaj, iuj opinias) estas tre interesaj kaj estas "aŭdeblaj" vortoj kaj esprimoj., kiujn nenie oni povas legi.

En la lastaj numeroj estas tre interesa la kampanjo pri solidareco al la Latina Ameriko.

Sed ĝenerale la plej interesa sekcio estas la debato pri cirkulantaj leteroj kie oni diskutas pri tre aktualaj kaj tre interesaj temoj.

Peranto en Hispanio: José Bernabeu, Gral. Primo de Rivera, 6, Callosa de Segura (Alicante).



THE GREAT DICTATOR (LA GRANDA DIKTATORO) (1940) Charles Chaplin. Tiu ĉi majstra filmo, kiu, krom vidinda estas videnda, reĝisorita kaj ĉefrolita de Chaplin, celis levi la animon de la homoj dum la ĵus komencita mondmilito kaj esperigi ilin parodiante kaj minimigante la diktatoron, kiu ekterurigis la mondon dum tiuj jaroj.

Sed kio eternigos tiun filmon estas la fakto, ke Chaplin antaŭ ol scii la finon de la milito, kiam la granda diktatoro estis en la apogeo, jam komprenis kaj stampis en la celuloide la finon kaj detruigon de la faŝisma sistemo. Poste, la mondo konstatis, ke li pravis kaj ke ĉiuj diktatorecaj reĝimoj mortis aŭ mortos.

Nur la spektado de la prelego de la juda barbiro aganta kvazaŭ la diktatoro Hynkel, kiu finigas la filmon, jam komprenigas al ni la kialon de tridek kvin jara malpermeso en nia lando de tiu filmo.

Se vi atente rigardas la scenojn okazantajn en la juda kvartalo, vi konstatos, ke pluraj afiŝoj kaj skribaĵoj estas esperantlingvaj, kio pruvas la altan disvastiĝon, kiun atingis Esperanto en tiu epoko.